# Walter kaj Renate Klag

# Stelo

## La mono de la Esperanto-Komunumo













Wien - Vieno 2025

Sesa eldono

Sechste Auflage

Vieno  2025

ISBN 978 3 903247 50 5

Prezo 10 €




Verlag – Eldonejo  Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11

1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio

esperanto@chello.at

Walter kaj Renate Klag

# Stelo

## La mono de la Esperanto-Komunumo




Kun kontribuaĵoj de Sabine Deopito,
Bert Boon kaj Rogier Huurman

# Enhavo

Historio de la universala mono - Spesmilo

Steloj – la unua generacio

La dua generacio – Steloj el plasto 2012

Steloj el nobla metalo – la tria generacio

La arĝenta monero 100 Steloj 2018

La arĝenta monero 50 Steloj 2020

La monero 5000 Steloj el plateno 2025

Stelo-aŭkcioj

Esperanto-Numismatika Asocio

Stelo-Tabeloj

# Historio de la universala mono


René de Saussure [röné dö sosűr] naskiĝis la 17an de marto 1868 en Ĝenevo. Post la studado de lingvistiko kaj matematiko li publicis sian plej gravan verkon „Fundamentaj reguloj de la vort-teorio en Esperanto: Raporto al la Akademio Esperantista“.
1907 universitata profesoro d-ro René de Saussure prezentis projekton de universala monsistemo, kiun li nomis „Spesmilo“. El la franca vorto „espèce" [espés] li formis la vorton „speso".











Unu Spesmilo (Sm) = 10 spescentoj (Sc) = 100 spesdekoj (Sd) = 1000 Spesoj. La Spesmiloj oficiale uziĝis ĉe kelkaj britaj kaj svisaj bankoj. Poste fondiĝis Ĉekbanko Esperantista de Herbert Höveler.

La valoro de unu Spesmilo estis la sama kiel 0,733 g da pura oro. Tial oni povis facile kalkuli: 1 Sm = 2 Britaj Ŝilingoj = 1 Rusa Rubelo = 0,5 Usonaj Dolaroj =
2,5 Svisaj aŭ Francaj Frankoj = 2,5 Hispanaj Pesetoj.
Ekde la malfondo de Ĉekbanko Esperantista en la jaro 1918 la Spesmilaj moneroj havas nur numismatikan valoron kaj estas nun tre ŝatataj kolektaĵoj.
Hodiaŭ Spesmilo estas la nomo de internacia investa firmao www.spesmilo.com kun la sidejo en Londono.

## Steloj – la unua generacio




1942 fondiĝis Universala Ligo en Nederlando.
Tiu organizo aktivis por la internacia kompreniĝo kaj universala monsistemo, la Stelo. La unuaj moneroj – nominaloj unu, kvin kaj dek Steloj - pregiĝis 1960 kun la jarindiko 1959.
1965 sekvis tri variantoj de 25-Stelo-monero. Eldoniĝis ankaŭ paperaj monbiletoj. Tiuj Steloj bone taŭgis por la transpago

de etaj sumoj. Ankaŭ tiuj moneroj kaj kuponoj kolektiĝas de numismatoj.

## La dua generacio - Steloj el plasto 2012

2012 eldoniĝis plastaj Steloj en Belgio. Ili havas la nominalojn unu, tri kaj dek Steloj. La eldonkvanto estas po 3000. Ili uziĝas dum junularaj Esperanto-kongresoj, ekzemple dum la 9-a Junulara Esperanto-Semajno JES 2017/18. Aliĝis tie 286 personoj. Jen la kurzo de la Stelo dum tiu evento:

Fonto: https://www.facebook.com/plastamono

**Stelaro**
December 18 at 11:58am ·

La kurzoj inter steloj kaj aliaj monunuoj dum JES 2017/18:

EUR: € /★: 4,117 ★/€ : 0,2429
BRL: R$/★: 1,085 ★/R$: 0,9214
PLN: zł /★: 0,980 ★/zł : 1,020

Dum JES do funkcios jenaj ŝanĝoj:
€5->20★; €10->41★; €20->82★; €50->205★
zł10->10★; zł20->21★; zł50->54★; zł100->108★; zł200->217★

**La aktuala valoro de la Stelo:**

**4 Steloj = 1 Eŭro**




Plastaj Steloj 2012

# La renaskiĝo de Steloj

Rogier Huurman, Nederlando
(aktualigita)

Dum FESTO 2012 en Métabief (Francio), Alexandre 'Alekĉjo' Raymond venis al mi kun freneza sed interesa ideo: eldoni Esperanto-monon. Tiutempe FESTO multe novigis, ĝi eldonis proprajn tasojn, ĉemizojn kaj pli. Dum la renkontiĝo grupo de homoj ĉirkaŭ tablo diskutis kiel aspektu la moneroj, kiom ili valoru kaj kiel ili funkciu.
Post la somero Alekĉjo kontaktis pregejon de plastaj moneroj por taksi, kiom realigebla estas la ideo. La plano fine aspektis jene:

- Estu moneroj de 1, 3 kaj 10 steloj. Tio ebligos rapidan pagadon de diversaj eblaj monsumoj.
- La moneroj estu malsamkoloraj kaj malsamgrandaj, por ebligi facilan kaj rapidan uzon.
- La koloroj estu ruĝa, flava kaj verda, kaj la simboloj gufo, papago kaj krokodilo.
- La valoro de unu stelo egalu al la plej malgranda kutima elspezo en trinkejo aŭ gufujo, do unu taso da teo aŭ unu glaso da kolao.

La finaj desegnoj estis senditaj kaj po 3000 moneroj estis pregitaj en oktobro 2012. Bonŝance en la fino de oktobro okazis malgranda renkontiĝo, kiun mi kunorganizis: Klaĉ-Kunveno Post-Somera (KKPS) en Nederlando. Ĝi estis perfekta por testi la novan monsistemon. La publiko ŝatis la monerojn, kaj sukcesis adaptiĝi al ĝia uzado. Post KKPS la Itala Esperanto-Junularo iĝis kuninvestanto de la projekto.
La originala valoro estis difinita kiel 4,2 steloj en unu eŭro. Poste la valoro estas ligita al la inflacie kompensitaj valoroj de eŭro, realo kaj zloto kun pezoj de 76%, 20% kaj 4%. Do same kiel la antaŭa stelo, tiu ĉi stelo teorie tenos sian valoron. Ekde 2012 ĝis 2017 la valoro de unu eŭro en steloj variis inter 4,040 kaj 4,581.

La steloj estas ĉefe uzataj en trinkejo de junularaj Esperanto-renkontiĝoj. Ili estas valida pagilo en KKPS 2012-2017, IJF 2013-2017, JES 2012 kaj 2017, SES kaj FESTO 2013 kaj IJK 2015. Krome ili uziĝis en kelkaj trajnkaravanoj kaj eblas mendi ilin poŝte ĉe Alekĉjo aŭ Roĉjo. Daŭre uziĝas steloj dum ĉiu IJF (paske) kaj KKPS (aŭtune). Krome ili uziĝos dum la IJK 2020 en Nederlando.
La avantaĝoj de steloj en trinkejo estas la facila uzo, la malalta pezo relative al metalaj moneroj, kaj la fiero havi specialan Esperanto-monon. La ĉefa malavantaĝo estas la bezono interŝanĝi alian monon kontraŭ steloj en la komenco de la renkontiĝo.
La kvanto pregita en 2012 devus sufiĉi por uzo en eĉ la plej grandaj junularaj renkontiĝoj. Se ilia uzo aŭ kolektado ekster la junulara movado ankaŭ kreskos, tiam dua presado estos pripensinda.

Rogier 'Roĉjo' Huurman

## Steloj el nobla metalo – la tria generacio

La Esperanto-kulturo havas ne nur proprajn lingvon, literaturon, historion kaj muzikon, sed ankaŭ propran monon: Iam la Spesmilon, nun la Stelon. Aktuale uziĝas Stelo-moneroj dum junularaj Esperanto-kongresoj.
Tia monero estas facile montrebla simbolo de la viveco de la Esperanto-lingvo.
Esperanto-Steloj havu ankaŭ internan metal-valoron.
Tial eldoniĝis moneroj el arĝento kaj plateno.

# La arĝenta monero 100 Steloj 2018

La medalo en la formo de monero aperis okaze de la 150a naskiĝdatreveno de René de Saussure la 17an de marto 2018.
Li estis la inventinto de la universala mono.
Limigita eldonkvanto: 1000.
Maso:  1 unco da arĝento 999/1000 (31,1 gramoj).
Pro la leĝa situacio en Aŭstrio la arĝentostampo estas 925.
Diametro: 37 mm. Surfaco: Brila (prooflike).
Eldonisto: Mag. Walter Klag, Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio.
Dezajnistoj: Mag. Walter Klag kaj Mag. Helmut Andexlinger, la ĉefgravuristo de Münze Österreich.

> Helmut Andexlinger gvidas ekde 2016 la gravuristan sekcion de Münze Österreich. En la aŭstria urbo Steyr li sukcese trapasis la gravuristan edukadon. Poste li studis komunikado-sciencon en la Viena Universitato. Unu el liaj plej grandaj sukcesoj estas la dezajno de la 2-Eŭra monero 2012, kiu cirkulas en 17 landoj – li gajnis en konkurso kontraŭ  800 aliaj partumantoj.

Produktisto: Münze Österreich AG, Wien 3., Am Heumarkt 1, muenzeoesterreich.at.
Münze Österreich AG estas 100%-a filia kompanio de Aŭstria Nacia Banko.

Se vi havas demandojn, bonvole skribu al esperanto@chello.at.
Pliaj bildoj:
https://commons.wikimedia.org/wiki/Category:Stelo

René de Saussure:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Ren%C3%A9_de_Saussure




Dua desegnaĵo, farita de mag. Andexlinger.
29a de marto 2017



Mag. Helmut Andexlinger
© Münze Österreich AG  Manfred Burger





La stampiloj

**La arĝento-stampo 925**

Sub la surskribo

„ARĜENTO 999“



La litero A en neregula sesangula kadro estas la eksporta stampo.

La litero A en cirklo estas la enlanda stampo respektive la firmaa signo.

Ambaŭ uziĝas de Münze Österreich (Aŭstria Monerfarejo) ekde 1921.

925 = 925/1000 da arĝento.

Laŭ aŭstria leĝo la maksimuma elmilaĵo de arĝentostampo estas 925, kvankam la medalo konsistas el 999/1000 da arĝento.

Laŭ informo de sinjorino mag. Deopito,

Münze Österreich.

## Stelaro



Po 30 ekzempleroj de la 100 Steloj liveriĝis sur tiuj pletoj de Münze Österreich AG.

# Oficiala atesto 100 Steloj

MÜNZE ÖSTERREICH

Zertifikat Extern
Inspection Certificate

| | |
|---|---|
| Mag. Walter Klag<br>Delegierter des Esperanto-Weltbundes<br><br>Rudolfinergasse 8/11<br>1190 Wien | Bestellnummer / Purchase Order:<br>---<br>Kundenmaterialnummer / Article No.:<br>---<br>Stückzahl / Quantity:<br>1.000 |
| Kundennummer / Customer-No:<br>519992 | MÖAG Auftragsnummer / Sales Order:<br>1394034 |
| Materialnummer / Item number: 23005 | Esperanto Medaille Ag999 D37 1Oz |

Prüfungen und Prüfergebnisse / Tests and Results

| Prüfung<br>Test | Stichprobe<br>Sample Size | Toleranzen<br>Tolerances | Messwerte<br>Results |
|---|---|---|---|
| Legierung<br>Alloy | 11 | min. Ag 999 ‰ | > Ag 999 ‰ |
| Gewicht<br>Weight | 100% | 31,18 g -0,07/+0,32 g<br>31,11 - 31,50 g | 31,11 - 31,50 g |
| Durchmesser<br>Diameter | 10 | 37,00 mm ±0,10 mm<br>36,90 - 37,70 mm | 37,04 - 37,07 mm |

| | |
|---|---|
| Prüfung / Inspection<br><br>Ing. Engel | Laborleitung / Head of Laboratory<br><br>Ing. Mag. (FH) Rupprecht<br><br>Wien, 26.04.2017 |

# La pregomaŝino de la firmao Gräbener




Tiu maŝino pregis la 100 Steloj-monerojn.

# La arĝenta monero 50 Steloj 2020

Por la honoro de Julia Isbrücker eldoniĝis 2020
la 50-Stela monero el arĝento 925/1000.
Eldonkvanto: 300 ekzempleroj.
Dezajnistoj: Mag. Walter Klag kaj
Mag. Helmut Andexlinger, la ĉefgravuristo de
Münze Österreich AG.
Diametro 40 mm. Maso 30 g.












# Julia Isbrücker
# Biografio

(Aŭtoraj rajtoj ne konataj)

Julia C. Isbrücker estis nederlandanino. Ŝi naskiĝis en Rotterdam la 22-an de septembro 1887, ĝuste kiam ekaperis publike la internacia lingvo Esperanto. Ŝi naskiĝis kiel Julia C. Dirksen, kaj mortis la 14-an de januaro 1971.
Ŝiaj engaĝiĝoj estis gravaj: Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio (la plej granda organizaĵo de tutmonda esperanto-movado), membro de Internacia Centra Komitato kaj membro de la ekzamena komitato, prezidanto de la grupo en Hago kaj edzino de la vicprezidanto de UEA, Johannes Rijk Gerardus Isbrücker, kies familian nomon ŝi surprenis. Post la dua mondmilito la geedzoj skribis sian nomon sen tremaoj (do Isbrucker, kies prononco restis la sama).
Ŝi gvidis kursojn, faris prelegojn, ankaŭ pri pacifismo. Organizis la internacian Interreligian Konferencon en Hago en 1928, fondis kun Andreo Cseh (Ĉe) la internacian Cseh-Instituton en 1930 (poste nomita Internacia Esperanto-Instituto.) Andreo Cseh estas tiu, kiu adoptis specialan instrumetodon por lernigi la lingvon: sen helpo de libroj, metodo kiu estas utiligata ankaŭ nuntempe, kaj kiun oni nomis devige Cseh-metodo.
Post la dua mondmilito, pro la okazinta detruo de Cseh-Instituo, denove kun Andreo Cseh ŝi fondis la unuiĝon Universala Ligo, mondfederistan organizaĵon surbaze de la verko de Clarence K. Streit. La oficiala lingvo estis Esperanto, sed povis aliĝi al ĝi ankaŭ neesperantistoj.
Ŝi multe verkis kaj tradukis: kune kun sia onta edzo ŝi tradukis, en 1923, Akbar; en 1952 ŝi tradukis „La alia

Pasinteco" de Rico Bulthius. Alia ŝia traduko estas de la verko de Martin Kojc, titolita „La lernolibro de la vivo", kaj ŝi daŭre kaj intense kunlaboris, jam ek de la komenco (1932), ĉe la gazeto La Praktiko, kiu fariĝos la oficiala organo de Universala Ligo. Vi povas trovi kaj legi ĉi tiun gazeton rekte el la retejo de Esperanto-Muzeo en Vieno, ĉi tie inter la ciferecigitaj periodaĵoj.
https://en.wikipedia.org/wiki/Julia_Isbr%C3%BCcker



Julia Isbrücker

Foto (aŭtoro ne konata) kaj
desegnaĵo farita de mag. Helmut Andexlinger



Julia Isbrücker kaj Klara Zamenhof 1923 en Nürnberg dum la 15a Universala Kongreso. (Aŭtoraj rajtoj ne konataj)
Klara Zamenhof, edzino de L. L. Zamenhof, naskiĝis kiel f-ino Silbernik la 5-an de oktobro 1863 en Kowno, mortis la 6-an de decembro 1924 en Varsovio.
Fonto: Vikipedio.

# Oficiala atesto 50 Steloj

MÜNZE ÖSTERREICH

Zertifikat Extern
Inspection Certificate

| | |
|---|---|
| Mag. Walter Klag<br>Delegierter des Esperanto-Weltbundes<br><br>Rudolfinergasse 8/11<br>1190 Wien | Bestellnummer / Purchase Order:<br>---<br><br>Kundenmaterialnummer / Article No.:<br>---<br><br>Stückzahl / Quantity:<br>300 |
| Kundennummer / Customer-No:<br>519992 | MÖAG Auftragsnummer / Sales Order:<br>1838054 |
| Materialnummer / Item number: 25170 | Esperanto 2020 Ag925 D40 30g |

Prüfungen und Prüfergebnisse / Tests and Results

| Prüfung<br>Test | Stichprobe<br>Sample Size | Toleranzen<br>Tolerances | Messwerte<br>Results |
|---|---|---|---|
| Legierung<br>Alloy | 4 | min. Ag 925 ‰ | Ag 927 ‰ |
| Gewicht<br>Weight | 100% | 30,00 g ± 0,20 g<br>29,80 - 30,2 g | 29,80 - 30,2 g |
| Durchmesser<br>Diameter | 10 | 40,00 mm ±0,10 mm<br>39,90 - 40,10 mm | 40,05 - 40,06 mm |

Bemerkungen / Remarks: ---

| Prüfung / Inspection | Laborleitung / Head of Laboratory |
|---|---|
| Ing. Engel | i.V. ~~Ing. Herczeg~~<br>Wien, 03.04.2020 |

MÜNZE ÖSTERREICH AKTIENGESELLSCHAFT Am Heumarkt 1 Postfach 181 1031 Wien www.muenzeoesterreich.at
Tel +43 1 717 15-0 office@muenzeoesterreich.at Fax Verkauf +43 1 715 86 10 verkauf@muenzeoesterreich.at
BAWAG P.S.K. IBAN AT20 6000 0000 0700 9011 BIC BAWAATWW Handelsgericht Wien FN 55543g UID-Nr. ATU 371 14706 ARA-Nr. 7352

# Nova monero 5000 Steloj el plateno

La Aŭstria Monerfarejo AG pregis 2025 platenan moneron
kun nominala valoro de 5000 Steloj.

**Eldonkvanto: Nur 25 ekzempleroj.**

Materialo pura plateno 999,5/1000.
Diametro 30 mm ± 0,1 mm.
Maso 15,56 g ± 0,1 g (½ unco).




**Prezo: 1200 €**

Pregita en ringo, ripa rando, stampita, kvalito prooflike.
Pakita en travidebla akrila kapsulo.

Averso: 5000 STELOJ 2025 — ESPERANTO – DUONA UNCO
DA PURA PLATENO 999,5 – Steloj.
Platenstampo laŭ Aŭstria leĝo Pt 950.

Reverso:
Motivo prenita el 50 Steloj
"JULIA ISBRÜCKER ESPERANTO 1887-1971"

Informoj: Walter Klag, Vieno esperanto@chello.at

# 25 moneroj je 5000 Steloj



# Monero kaj stampiloj




Foto: Münze Österreich AG



Zertifikat Extern
Inspection Certificate

MÜNZE ÖSTERREICH

Mag. Walter Klag
Rudolfinergasse 8/11
1190 Wien

ÖSTERREICH

| | |
|---|---|
| Kundennr. / Customer no.: | 519992 |
| Auftragsnummer / Order no.: | 2888816 |
| Bestellnummer / PO no.: | Hr. Mag. Klag Esperanto |
| Kundenmat.nr. / Article no.: | |

| Materialnr. / Prod.no | Bezeichnung / Description | |
|---|---|---|
| 27850 | Klag/Esperanto 2025 Pt999,5 D30 15,56g | |
| Chargen | | Stückzahl /Qantity |
| MET 03/24 | | 25 |

| Prüfung<br>Test | Stichprobe<br>Sample Size | Mittelwert<br>Average | Messwerte / Results<br>Standardabw.<br>Std. Deviation | Minimum | Maximum |
|---|---|---|---|---|---|
| Legierung /Alloy<br>min. Pt 999,5 ‰ | 4 | --- | --- | 999,5 ‰ | --- |
| Gewicht / Weight<br>15,460 - 15,660 g | 100% | --- | --- | 15,460 g | 15,660 g |
| Durchmesser / Diameter<br>29,90 - 30,10 mm | 5 | --- | --- | 29,98 mm | 29,99 mm |

Bemerkungen / Remarks: ---

Prüfung / Inspection
Grosshauser

Laborleitung / Head of Laboratory
i.V. Engel

Wien, 18.02.2025

# Stelo-Aŭkcioj

## Aŭkcio okazigita de la internacia magazino MONATO

Monato aŭkciis 25 orajn stelojn.

La minimuma sumo estis 2500 eŭroj. La aŭkcio daŭris ĝis la 1a de septembro 2017 je la 12a horo mez-eŭropa tempo.

La ora monero de 25 steloj estas tre valora kolektindaĵo, ne nur inter esperantistoj, sed ankaŭ inter numismatoj en la tuta mondo. Ĝi pezas 50 gramojn kaj konsistas el 98,3 % da pura oro kaj do nur la oro jam valoras 1800 eŭrojn. De ĝi estis faritaj nur 10 numeritaj ekzempleroj. Ne estas konate, kiom da ili restas en la mondo, sed MONATO sukcesis akiri unu el tiuj dek ekzempleroj, en la originala kesteto, la moneron kun serinumero 7.


La gajno de la aŭkcio estos uzata por la ordigo de nova Esperanto-domo en Antverpeno, kie MONATO estas administrata.

Rezulto de la aŭkcio: 3200 €.

La feliĉa aĉetinto estas svisa Esperanto-parolanto.




Unu el la dek oraj 25-Stelaj moneroj
vendiĝis pere de aŭkcio.
Ĝi portas la numeron 7.




Verŝajne temas pri la lasta ekzemplero de tiu raraĵo.

**Aŭkcio en Dorotheum, Vieno, Aŭstrio**
la 23an de majo 2019

En la aŭkcio estis du serioj
1+5+10+100 Steloj 1959 ĝis 2018

https://www.dorotheum.com/de/a/58845/




Lot Nr. 1572

Esperanto- Steloj

Erzielter Preis:
**EUR 85,-**

Rufpreis:
**EUR 70,-**

Auktion: Münzen, 23.5.2019




Lot Nr. 1573

Esperanto- Steloj

Erzielter Preis:
**EUR 110,-**

Rufpreis:
**EUR 70,-**

Auktion: Münzen, 23.5.2019

Auktion aŭkcio Dorotheum Steloj 2023 05 11 Los 1027 + 1028




< ZUM AKTUELLEN LOS




Lot Nr. 1027

## Esperanto-Steloj

Verkauft EUR 220

Startpreis:
**EUR 130**

Serie zu 1, 5 und 10 Steloj 1959 (geprägt 1960 in Utrecht), AR 50 Steloj 2020 (Auflage 300 Stk.), AR 100 Steloj 2018 (geprägt 2017, Auflage 1000 Stk.), beide geprägt in Wien. Dabei Heft zum Steloj Geld der Esperantogemeinschaft I/PP




Lot Nr. 1028

## Esperanto-Steloj

Verkauft EUR 320

Startpreis:
**EUR 130**

Serie zu 1, 5 und 10 Steloj 1959 (geprägt 1960 in Utrecht), AR 50 Steloj 2020 (Auflage 300 Stk.), AR 100 Steloj 2018 (geprägt 2017, Auflage 1000 Stk.), beide geprägt in Wien. Dabei Heft zum Steloj Geld der Esperantogemeinschaft I/PP

# Esperanto-Numismatika Asocio

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la fakgrupo „Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo „Esperanta Numismatiko”, probable la unuanura tia fakgrupo en la historio de Esperanto.

La instiga fakto estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

2014 - 2025 ENA varbis mondvaste 170 individuajn membrojn kaj 25 asociajn membrojn.

Agrable por ni kaj vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: „Mi konsentas aliĝi”).
Krome la *NUR PERRETA* revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn, 4 numerojn jare.

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA. Se vi deziras kromajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be

Vi rajtas unue peti provnumeron! Vi decidos poste!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de „Esperanta Numismatiko”

# STELO-TABELO

| Nominalo | Materialo | Maso | Dia-metro | Jaro | Eldon-kvanto |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 Stelo | Bronzo | 3,4 g | 20 mm | 1959[1] | 5000 |
| 5 Steloj | Latuno | 5,0 g | 23 mm | 1959[1] | 5000 |
| 10 Steloj | Cu – Ni | 9,0 g | 28 mm | 1959[1] | 5000 |
| 25 Steloj | Cu-Ni 75-25 | 19 g | 37 mm | 1965 | 1000 |
| 25 Steloj | Ag 0,900 | 25 g | 37 mm | 1965 | 5000 |
| 25 Steloj | Au 0,983 | 50 g | 37 mm | 1965 | 10 |
| 1 Stelo | Plasto ruĝa | 0,8 g | 23 mm | 2012 | 3000 |
| 3 Steloj | Plasto flava | 0,9 g | 25 mm | 2012 | 3000 |
| 10 Steloj | Plasto verda | 1,3 g | 29 mm | 2012 | 3000 |
| 100 Steloj | Ag 0,999[2] | 1 unco 31,1 g | 37 mm | 2018[3] | 1000 |
| 50 Steloj | Ag 0,925 | 30 g | 40 mm | 2020 | 300 |
| 5000 Steloj | Pt 0,9995[4] | ½ unco 15,6 g | 30 mm | 2025 | 25 |
| 10000 Steloj | projekto | | | | |

Ag = arĝento, Au = oro, Cu = kupro, Ni = nikelo, Pt = plateno
g = gramo.
Produktado de la plastosteloj: Stekelbees, Belgien.
Retpaĝo http://www.plastic-coins.com

[1] Pregitaj en la jaro 1960
[2] La monero konsistas 999/1000 el Ag, pro la leĝa situacio en Aŭstrio la Ag-stampo estas 925.
[3] Pregitaj en la jaro 2017
[4] La monero konsistas 999,5/1000 el Pt, pro la leĝa situacio en Aŭstrio la Pt-stampo estas 950.

# Nombro de la Stelo-Moneroj

| Nombro de la Stelo-Moneroj | Tuta nominalo |
|---|---|
| 5000 je 1 Stelo el ne-nobla metalo 1959 | 5000 Steloj |
| 5000 je 5 Steloj el ne-nobla metalo 1959 | 25000 Steloj |
| 5000 je 10 Steloj el ne-nobla metalo 1959 | 50000 Steloj |
| 1000 je 25 Steloj el arĝento 1965 | 25000 Steloj |
| 5000 je 25 Steloj el ne-nobla metalo 1965 | 125000 Steloj |
| 10 je 25 Steloj el oro | 250 Steloj |
| 3000 je 1 Stelo el plasto 2012 | 3000 Steloj |
| 3000 je 3 Steloj el plasto 2012 | 9000 Steloj |
| 3000 je 10 Steloj el plasto 2012 | 30000 Steloj |
| 1000 je 100 Steloj el arĝento 2018 | 100000 Steloj |
| 300 je 50 Steloj el arĝento 2020 | 15000 Steloj |
| 25 je 5000 Steloj el plateno 2025 | 125000 Steloj |
| | |
| Sumo 31335 moneroj | 512250 Steloj |
| | |
| Sumo 29000 moneroj el ne-nobla metalo | 247000 Steloj |
| Sumo 2300 moneroj el arĝento | 140000 Steloj |
| Sumo 10 moneroj el oro | 250 Steloj |
| Sumo 25 moneroj el plateno | 125000 Steloj |
| *10000 Steloj* | *Projekto* |




Stelo-banko dum junulara kongreso

Fonto:  https://www.facebook.com/plastamono

**Pri la aŭtoroj**

Mag. Walter Klag, Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio
estas fakdelegito de UEA por numismatiko,
membro de Esperanto-Numismatika Asocio ENA kaj
membro de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio.
Mag. Renate Klag, Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio
estas fakdelegito de UEA por la angla lingvo kaj ekonomio kaj
membro de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio.
Kontakto:  esperanto@chello.at




Die Münze Österreich AG
La Aŭstria Monerfarejo

Wien 3., Am Heumarkt 1

Tie pregiĝis la moneroj
50, 100 kaj 5000 Steloj

# La Bulteneto

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO

La cifereca versio estas senpaga.

Mendu vian ekzempleron ĉe

esperanto@chello.at

La paperan version ricevas donace
Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, Aŭstrio;
aliaj bibliotekoj post peto.

Eldonistoj: Renate kaj Walter Klag.
Redaktejo - eldonejo - presejo:
Rudolfinergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio.



# Internationales Esperanto-Museum

Wien 1., Herrengasse 9
Haltestelle Herrengasse der U3
☏ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten
Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h
Donnerstag 10 bis 21 h

In diesem Haus befinden sich auch die
**Sammlung für Plansprachen,**
die **Musikaliensammlung**
und das **Globenmuseum**